

Vivu la libera pensado eĉ se la stomako murmuras!

„Unuflanke oni akcentas, ke libereco de penso estas ĉies plej alta bono, pli valora ol materia bonstato; aliflanke oni preferas la materian bonstaton.”

(G. J. D. en „S-ulo”, nov. 1952, p. 1.)

Per „aliflanke” la aŭtoro evidente aludas Sovetion. Nu, se la laboristoj en Sovetio — kiuj antaŭ la revolucio de 1917 tiom arde sopiris la liberecon de pensado k tiom multe suferis pro ĝi — efektive ĝuus materian bonstaton; sed ĝin preferus super la libereco de pensado, tiam tio signifus konsiderindan regreson en la menso de niaj tiaj samklasanoj.

Ŝajnas, ke G. J. D. akceptas tiun spiritostaton kvazaŭ naturan aferon, ĉar per neniu vorto li ĝin bedaŭris. Ĉu oni vere povas vivi nur per pano? Nur diktatoro povas opini tion! Mia tuta spirito protestus kontraŭ stato k ŝtato, en kiuj eĉ la pensado estas „reguligata” de la regantoj kaj en kiu eĉ la plej malgranda devio estas malpermesita! Sed G.J.D. eble - espereble - fantaziis, skribante „aliflanke oni preferas la materian bonstaton”, ĉar se oni efektive estus devigata vendi sian pensliberon kontraŭ peco da pano aŭ „materia bonstato”, la tiea mizero nepre estus tre granda! Espereble la aŭtoro fantaziis; se ne, mi preferus sekvi la lupon en jena fabelo de La Fontaine:

La lupo kaj la hundo

Lupo nur ostojn havis kaj felon,
Car akurate gardis la hundoj.
Jen tiu ĉi lupo renkontas korthundon
Tre belan, brilharan kaj ankaŭ tre fortan,
Kiu tra kampoj vagadis.
Ataki ĝin kaj pece disŝiri
Sinjoro lupo tute deziris;
Sed batali estas necese,
Kaj tiel forta kaj granda
Estis la besto, ke ĝi tre povis
Sentime sin mem defendi.
Tial humile sin proksimigas
La lupo, komencas interparoladon,
Kaj laŭdas ĝin pro la ĝia
Bonstato, kiun ĝi tute miras.
„Bela sinjoro,” diris la hundo,
„Vi, kiel mi, grasa fariĝi nun povas.”
„Lasu l' arbarojn, al mi vi kredu;
Car tie estas viaj la fratoj
Malĝojaj, meziraj, senhavaĵ vagistoj,
Kiujn atendas mort' pro malsato.
Car kio estas certa por lupoj?
Neniam facila, centima festeno;
Nenio sen batalado.
Min sekvu: vivadon pli bonan vi havos,
„Sed,” lup' diris, „kion faradi mi devos?”
„Ho! preskaŭ nenion,” respondis la hundo;
„Forpeli la homojn portantajn bastonojn
Kaj petadantajn almozon,
Flatadi domanojn, la mastron karesi,
Kaj estos via salaĵo
Multege da bonaĵ kaj sukaĵ manĝaĵoj:
Restaĵoj de kokoj, restaĵoj de ŝafoj,
Kaj ankaŭ multaj dolĉaj karesoj.”
Jam feliĉaĵon la lup' imagas,
Kiu ĝin dolĉe plorigas.
Irate, la kolon de l' hundo ĝi vidis
Senharan. — „Sed kio ĝi estas?” ĝi diris.
„Nenio.” — „Tamen?” — „Ho! bagatelo!”
„Plu klare diru!” — „La ĉirkaŭkolo,
Per kiu estas mi alligita,
Kion vi vidas eble ekkauzis.”
„Ligita!” rediris la lupo libere.
„Cu vi ne kuradas?” — „Ne, sed ne grava.
„Mi tiel grava ĝin taksas,
Ke viajn festenojn mi tute ne volas,
Kaj por tiela prezo trezoron
Mi certe ne volus.” — Ce tiuj ĉi vortoj
La lupo forkuris kaj kuras ankoraŭ.
(El: „Elektilaj fabeloj de J. de La Fontaine”,
esperant. de G. Vaillant. 1906) *Liberpensulo*



LIBERPENSULA ANGULO

La Vatikano volas revivigi la „mortintan latinan lingvon”

Sub la supra titolo aperis en nederlanda gazeto „La Telegraaf” laŭ sciigo en „New York Herald Tribune” artikolo pri la fakto, ke la Vatikano serioze klopodas revivigi la mortan latinan lingvon, kiu eble ankoraŭ flue estas parolata de kelkcentoj da intelektuloj en la tuta mondo. Per eldonado de gazeto „Latinitas” (sub gvido de s-ro Bacci) la Vatikano esperas atingi, ke la latina fariĝos vera mondlingvo, ĉar... s-ro Bacci opinias, ke ĝi pli taŭgas ol la moderna esperanto.

Ni esperantistoj, sciantaj ke nia komuna lingvo jam estas uzata de pluraj centmiloj da samideanoj en la tuta mondo, ne bezonas timi pri tiu nova klopodo krei plian lingvon tutmondan. Nia moderna lingvo evoluas k adaptiĝas al novaj, modernaj vortoj laŭbezono, k tiuj vortoj originas en la internaciaj lingvoj, sekve estas tuj rekoneblaj de multaj planedanoj.

Sed s-ro Bacci devis eltrovi novajn vortojn por nuntempaj esprimoj k, vidu, kiel li sukcesis en tio. Ĉu ili estas preferindaj al la esp. vortoj?

atombombo = globus atomica vi displo-
dens
lipharoj = superioris labri pili
kapitalismo = nimius divitiarum conges-
tus
komunismo = bonorum aequatio
demokratio = imperium populare (la plej
sukcesplena traduko)
eks-reĝo = rex solis deturbatus
feminismo = aequandus mulierum homi-
numque status
fotografio = imago luce impressa
intervjuo = visare aliquem ad percontan-
dum
maŝinpistolo = sydrobolum
jurnalisto = ephemeridum notitiarum au-
ceps
aŭtomobilo = machina quae interno ma-
chinamente sua sponte movitur

Provu, vi nelatinevenaj gelegantoj prononci ilin senerare k flue! Ĉu ili ne estas multe pli mallongaj k pli facile prononceblaj ol la rilataj esp. vortoj? Sendube vi estas konvinkitaj pri la ridinto de tiuj vaticanaj provoj. Sed ni ne kredu, ke la nura celo estas krei mondlingvon por ĉiuj mondloĝantoj. La maldomanda latina lingvo estis k estas precipe uzata de la katolika pastraro, do la modernigita latino servos por plifortigi la surteran povon de la katolika Eklezio.

Nu, tiu provo certe malsukcesos, ĉar la nova latino montriĝos tro malfacila por esti lernata de ĉiuj mondanoj (kontraŭa al la pli facila esperanto), k la tiurilataj klopodoj ankaŭ fiaskos, ĉar la kristana religio estas ideologio formortanta, k ĉiuj rimedoj por haltigi ĝian pereon estos paliativaj.

J. L. (23.835)

Liberpensula Frakcio

Sekve de la alvoko en nov. „S-ulo” la Frakcio estas starigita. Ni komencis nian propagandan laboron ĉe la naciaj liberpensulaj asocioj, kiuj jam sukcesis atentigi pri esperanto. Estas multe da laboro fareda de nia frakcio! Por aligi aŭ peti informojn (regularo, ktp), turnu vin al la nunaj landaj perantoj, aldona resp. kuponon, aŭ simplan afrankon por landoj, kie funkcias peranto.

(Daŭriĝo sur kol. 3.)

Deziraj korespondencoj

Principe individuaj korespond-anoncetoj kun ĝenerala enhavo estu adresataj al kdo R. Bitzer (SAT-Koresponda Servo), Belgradstr. 64/4 M, München 23, kun 2 resp. kuponoj. Simplaj anoncetoj en S-ulo kostas 40 cendojn (2 resp. kup.). Aldono pri preferoj duobligas la koston. Pago per kuponoj (sed ne per stampitaj aŭ nestampitaj PM!) al kdo C. v. Essen, Rotterdam, aŭ al SAT-Parizo (se tio ne eblas pagu al via landa peranto.).

— Gekorespondantojn el la tuta mondo, precipe ekster-eŭrope, pri sporto (naĝado k.a.) serĉas 14-jara knabino Sigrid Stöhr, Parststr. 13, Degendorf a. D., Germanio. Ankaŭ interŝ. PL.

— K-do Ralph Bonesper, New-York, Usono, troviĝas grave malsana en hospitalo. Korespondantoj havu paciencon ĝis lia resaniĝo.

— Ing. B. Jerkovic, agrikultura publicisto, Keršovanijeva Obala 7, Sarajevo, Jugoslavio, dez. kor. k interŝ. fakliteraturon kun eŭropaj landoj (ankaŭ kun Egiptio k Meksikio) pri evoluo de agrikulturo en tiuj landoj k pri agrik. propagando.

— 40 gelnantoj dez. kor. kĉl. Ĉiuj intereso-
satoj sendu PK por nia letervespero, kiu okazos la 11. marto. Resp. ni garantias. Esperanto Junul-Rondo, 96 rue de Nabécor, Nancy, Francio.

— K-do W. Mennigh, Grote Markt 4, Schiedam, Nederl., dez. kor. kĉl., pri muziko, sed ankaŭ pri aliaj temoj.

En nov. la knabinoj de Aldrig-Lernejo (Aldridge Road School), Birmingham, Britio, organizis vendadon por helpi pagi la vojaĝespezojn de eksterl. esperantistaj infanoj, kiuj vizitis Birmingham. en 1953. Ni enspezis £ 30, k restas ankoraŭ vendeblaj objektoj, kiujn ni deziras kompletigi por fari novan vendon. Se iu volas sendi ion, ni ĝoje akceptos, k tio helpos la propagandon. Preferindaj objektoj: pupoj naci-kostumaj k similaj aĵoj montrantaj la diverslandan originon. Sendu al k-ino H. Melton, Aldridge Rd. Second. Modern Girl's School, Birmingham 22 A.

Supra Lernejo de Kinesiterapio malfermata en Gvatemalo la 1-an de febr., serĉas profesor(in)on diplomitan de Supra Instituto de Gimnastiko (Kinesisto, Fizioterapisto), por instrui praktikan kurson de masaĝo, gimnastiko, ktp. Scipovo de hisp. lingvo. Detalojn aerpoŝte al D-ro Jules Bonge, 4-a Avenida, no. 5-04, Gvatemala-Urbo, Mez-Ameriko.

Dum aŭtuno 1953 okazos en Stokholmo tutmonda ekspozicio de infan-desegnoj, aranĝata de Sveda Laborista Esperanto-Asocio kunlabore kun ĉiutaga gazeto Aftonbladet. Moto: „Laboro k festo en mia hejmmregiono”. La desegnoj povas esti koloraj aŭ blank-nigraj. Sur ĉiu devas esti notita nacilingve k en esp-o la nomo de l' lando k titolo de la desegno, krome nomo k aĝo de la desegninto. Povas partopreni infanoj ĝis 15-jaraj. Ĉiu partoprenonto ricevos rekompencan. Post ekspozico en Stokholmo ni provos cirkuligi la desegnojn tra la tuta lando. Sukceso de tiu ekspozicio havigos al nia organizo bonan reputacion. Esperantistoj tutmondaj kunhelpu precipe geinstruistoj, atentante pri la supre nomita moto! Ni montru al la redakcio de la kunlaboranta gazeto, al ĝiaj legantoj k al la vizitontoj, ke esp-istoj vere kapablas fari praktikan interpopolan laboron.

Sveda Lab. Esperanto-Asocio, Barnhusgatan 8, Stokholmo.

Nunaj landaj perantoj:

Britio: B. J. Edgecombe, 6 Elmfield Rd., Monkton, Jarro, Co. Durham.

Francio: Andreo Gay, Rue Lambert Dumesnil, Herblay, S. et O.

Nederland: J. Liedermoo, St. Camer, 76, Tel. K. 3400-28792, De Bilt (U).

Sarlando: Jos. Burger, Warndtstr. 81, Klarenthal.